La Germana Klerigada Retservilo

la kleriga portalo en la reto

La Germana Klerigada Retservilo estas la centra vojomontrilo al informoj pri klerigado en la reto. Ĝi ofertas al ĉiuj interesatoj bazajn kaj altkvalitajn informojn kaj retfontojn - rapide, aktuale, amplekse kaj senpage. Kiel superservilo ĝi indikas unuarange informojn pri la Germana klerigada sistemo, kiujn prezentas i.a. la Federacio kaj la Federaciaj Landoj, la Eŭropa Unio, la universitatoj, lernejoj, federaci-landaj institutoj, ekster-universitataj esplor- kaj servo-instancoj, sciencaj fak-organizoj, bibliotekoj / dokumentadoj / muzeoj.

Temoj kaj ofertoj
Al la informaro de la servilo kondukas krom datumbanka demando du enhave strukturitaj alirvojoj:
Laŭtemaj katalogoj kaj ofertoj por diversaj celgrupoj.

La **temoj** ampleksas ĉiujn klerigajn ŝtupojn, de la elementa klerigado tra lernejo kaj profesia klerigado ĝis universitata klerigado, scienco kaj klerigado-esploro kaj plenkreskula resp. plu-klerigado. Kompletigas ilin superaj informoj pri la Germana klerigada sistemo kaj transversaj temoj kiel pedagogio por handikapuloj kaj socia laboro, informperiloj kaj klerigado, mondvasta klerigado kaj interkultura klerigado.

Oni trovas laŭtemajn indeksojn kun elektitaj fakaj informoj en la **ofertoj por la celgrupoj**: kleriga administrado, edukistoj, gepatroj, instruistoj, lernejanoj, profesi-instruantoj, profesi-lernantoj, studentoj, interesatoj pri pluklerigado, (klerigadaj) sciencistoj, handikapulaj pedagogoj kaj sociaj pedagogoj.

Rubrikoj
Aktualajn informojn, publikigitajn raportojn kaj teme koneksajn materialojn pri elektitaj centraj temoj ofertas la rubrikoj: gazetaraj informoj, "Bildung PLUS" (klerigado kaj pli), dosieroj, konsiloj el la redaktejo, gazetara dokumentado, aranĝoj, konkursoj kaj novaj retfontoj.

Servoj
Ĉu estas aktualaĵoj pri la klerigada servilo aŭ en siaj specifaj interesokampoj, la uzantoj povas regule ekscii per la dusemajna informbulteno, per la individua servopaĝo mia klerigada servilo kaj la informservilo RSS-Newsfeed. Oni povas traserĉi ofertojn aŭ anonci serĉon de laborlokoj per la bazaro pri klerigadaj laborlokoj, kiu estas organizata kune kun la Germana Societo por Edukadsciencoj (DGfE). La indeksoj pri klerigado enhavas difinojn de fundamentaj terminoj de la Germana klerigada sistemo kaj pri la Eŭropa dimensio de la klerigada kampo en la Germana, Angla kaj Franca lingvoj. En la rubriko demandoj al la redaktejo oni trovas informservon pri problemoj de la serĉado.

Serĉad-ebloj
Por serĉado sur la Germana Klerigada Retservilo estas je dispono granda datumaro i.a. kun indikoj de retmaterialoj, institucioj, personoj, aranĝoj kaj konkursoj. La serĉproceduro ankaŭ konsideras la bibliografiajn datumbankojn de la fakportalo pri

pedagogio, kiu ebligas per la "FIS Bildung Literaturdatenbank" (Faka Inform-Sistemo klerigado literaturdatumbanko) centran aliron por la serĉado de edukscienca literaturo. Apud la t.n. "simpla serĉo" en la tuta datumaro eblas per la "etendita serĉado", ankaŭ traserĉi elektitajn datumbankojn.

Proponi ligon
Per la butono ligon proponi la uzantoj povas mem enigi interesajn retmaterialojn, instituciojn, ĉefpaĝojn aŭ aranĝojn en tiutemajn datumbankojn de la Germana Klerigada Retservilo. Post kontrolo la redaktistaro transdonas la enigaĵojn en la datumaron de la portalo. Sole la enigilo por la enigo en la kalendaron de aranĝoj ekzistas ankaŭ en la Angla kaj la Franca.

Internaciaj uzantoj
Por internaciaj uzantoj servas mallonga priskribo de la Germana Klerigada Retservilo en pluraj lingvoj; la ĉefaj superrigardaj paĝoj ekzistas ankaŭ en la Angla lingvo.

La Lerneja Reto
Speciala oferto de la Germana Klerigada Retservilo estas la lerneja reto SchulWeb, specifa subportalo por lernejanoj kaj instruistoj. Kiel komunikada platformo ĝi peras kontaktojn kaj ĝemeliĝojn inter lernejoj kaj apogas komunikadon per temaj babilejoj kaj forumoj. La lerneja reto enhavas la plej ampleksan datumbankon de German-lingvaj lernejoj kun propra retpaĝaro en- kaj ekster-lande. Krome prezentiĝas pliaj lernejorilataj ofertoj kaj projektoj kiel lernejaj gazetoj, lernejaj radiostacioj, materialoj kaj vojaĝoj de lernejaj klasoj.

Pliaj informoj
Pliaj informoj pri la strukturo, funkcio kaj organizado de la Germana Klerigada Retservilo troviĝas en la paĝo-indekso, en la helpopĝo de la koncerna rubriko kaj en la respondeca adreso. Por instigoj, kritikoj aŭ demandoj la deĵorantoj de la Germana Klerigada Retservilo volonte estas je via dispono. Skribu al ni!

Via teamo de la Germana Klerigada Retservilo

Wenn Sie Deutsch verstehen, gehen Sie gleich zum Deutschen Bildungsserver.

Por trovi kelkajn ligojn pri Germanujo kaj edukado bv. transiri al la Angla versio.